Estas kredeble, ke aroj da tradukistoj baraktas kun farado de nepre malbonaj tradukaĵoj, kaj ŝvite provas kunkuri la inundon de dokumentaĵoj, kvankam estus sufiĉaj unu bone organizita centro tradukanta en esperanton kaj instruado de esperanto en ĉiuj mezaj kaj altgradaj lernejoj de la mondo. Prilaboro de ĝenerala, universala, unusenca esperantlingva fakterminaro por ĉiu branĉo de scienco kaj tekniko estus nekredebla ŝparo de

spiritaj energioj.

Tiujn demandojn esperantistoj antaŭ jardekoj jam lanĉis kaj respondis, tamen oni povas sperti grandan seninteresiĝon, konservativecon eĉ en la revoluciigaj sferoj de scienco kaj teknikoj.”

Nun ni rigardu la situacion de la farmaciistoj. Ili laboras parte en apotekoj, parte en esplorinstitutoj kaj sanitaraj institutoj. Por esploristoj estas necese koni la rezultojn, kiuj naskiĝis en la faktereno. Tial fakrevuoj alvenas el la tuta mondo. Sed fakuloj komprenas nur malgrandan parton de la artikoloj, tial oni tradukas ilin preskaŭ sensisteme, kio kaŭzas grandan elspezon, sed malgrandan profiton.

Nia redakcio klopodas helpi la legantojn, konigante artikolojn el ĉirkaŭ 20 interŝanĝe ricevita fakrevuoj. Sed tiu konigo ne povas esti kompleta, ni ja ne havas fakulojn, kiuj konas, ekzemple, la portugalan, finnan, svedan, danan, nederlandan, francan, italan, ĉeĥan, kroatan, polan lingvojn.

Kaj hungaraj fakuloj — kiamaniere ili povas publikigi? Iliaj valoraj konoj preskaŭ ne povas trapaŝi la landlimojn, kvankam per esperanto ili povus fariĝi tutmonda trezoro. La aŭtoroj foje ricevas petojn pri kopioj de artikoloj. Ili sendas la artikolojn, sed ili ne estas certaj, ke la petinto, pro la tradukaj malfacilaĵoj, povas uzi ilin.

Sciencajn kongresojn ofte vizitas hungaraj farmaciistoj, sed pro la lingva problemoj ili nur malmulte komprenas kaj profitas la prelegojn.

Tiuj problemoj, konataj tutmonde, jam ne kuraceblas per tradicia ”recepto”.

De nia revuo nur kelkcent ekzempleroj iras eksterlanden. Pro la esperantlingvaj resumoj eble grandiĝos la eksterlanda disvastigo, ja esperantistaj farmaciistoj troviĝas en multaj landoj.

Miklós Láng

[El *Budapeŝta Informilo*]

Ett engelskt program om esperanto

Ibland kan även radioprogram på andra språk än esperanto komma med lite överraskningar. En som lyssnar på radio är Kaj Stridell, som den 16 augusti tog in det engelska programmet från Utlandsradion och upptäckte att det handlade om esperanto. Här nedan kommer hans rapport med kommentarer om saken. Den är skriven för VEKA gazeto, Västeråsklubbens medlemsblad.

” 'A gentleman in London, Charles A. Fields' och Michael J. Robinson i Australien, som använt esperantotryckt brevpapper och kuvert, fick med frågan 'When are you going to give us a programme in esperanto?' utlandsredaktionen på Sveriges Radio att göra ett inslag, som den 16 augusti sändes åtta gånger i sändningar åt olika håll i världen. Det var den engelskspråkiga sändningen som fick släppa till tiden, och programmet var förstås helt på engelska. Men det handlade om esperantosituatio-

nen i Sverige och den som berättade var Ulla Luin. Den ene av programledarna, 'Stanley', råkade dessutom vara en av Sveriges esperantostuderande! [Stanley Bloom, medlem av Esperantoförbundet genom Tyresöföreningen] Inte nog med att hela situationen var litet ovan — samtalet gav inte de vanliga fakta man vant sig få höra och se i intervjusammanhang.

Vi fick veta att Ulla lärde sig esperanto för att pappa och mamma använde det som hemligt språk för att diskutera hennes födelsedagspresenter, men att hon under barndomen inte lärdes någon esperanto hemma. I sin egen familj har hon emellertid haft esperanto som första språk sedan hon träffade Franko, och av vana fortsätter man så även nu, och tvååringen lär sig både svenska och esperanto.

Något förvånad blev jag av uppgiften att det bara finns 2 000 som kan esperanto i Sverige (=

antalet organiserade i SEF). Nog brukar vi väl skryta med några fler utåt? Ullas siffra kommer så otäckt nära sanningen, tycker jag. På frågan om esperanto någonsin varit stort i Sverige ville Ulla vända på frågan och säga, att med tanke på att språket inte är äldre än 90 år, så är det förunderligt, att det hunnit få denna spridning! Det är inte bara så att dessa svenska esperantister kan ett språk — med hjälp av det har de dessutom egna kontakter med människor i en stor mängd länder över hela världen.

Sverige borde vara ett bra land för esperanto, eftersom vårt språk är så litet utbrett. SEF är en av de starkare esperantoorganisationerna i världen. Kongressen i Stockholm förra året gav mycket välbehövlig publicitet, liksom EsperantoCentro i Stockholm. Det finns ett femtiotal klubbar landet runt som sprider information i form av utställningar, utdelning av broschyrer och föredrag i skolor. Vi borde ha mera intensiv propaganda! Man kan studera esperanto i svenska skolor inom ramen för fritt valt arbete. Det är problem att få tag på lärare.

I korthet är detta vad Ulla fick svara innan hon avslutningsvis fick hälsa till de lyssnare (man förutsatte att det fanns fler än de två) som förstår esperanto: 'Mi volas kore saluti esperantistojn, kiuj skribis al ĉi tiu programo. Dankon pro la leteroj!'

Det är svårt att under några minuter i en radiostudio få fram precis de viktigaste informationerna, det kan jag skriva under på. Detta var dock ett mycket nyttigt program, med tanke på den målgrupp som det vände sig till.

Det ger oss dessutom en nyttig påminnelse om hur viktigt det är att vi försöker ge oss tid att lyssna på och skriva till de stationer som redan sänder på esperanto, för lyssnarrapporterna är deras enda föda! De måste ständigt få veta att deras program avlyssnas, annars dras det in till förmån för lukrativare språkområden — det var så de svenska esperantosändningarna försvann en gång i tiden. Kunde vi bara få folk över hela världen att enträget skriva till Sveriges Radio, funnes en chans att de tar upp sändningarna igen!"

Kaj Stridell

NÄSTA BOK i bokklubben NovaLibro

Mondo de travivaĵoj
av Tibor Sekelj
Medlemspris 62,— kr

Extra medlemserbjudande till dig som blir medlem nu och som behåller *Mondo de travivaĵoj*:

Tra lando de indianoj
(också av Tibor Sekelj) för halva priset: 20 kr (ordinarie pris 40 kr)

Som medlem tar du emot 3 — 5 böcker per år, och antingen betalar du dem inom 10 dagar, eller också skickar du tillbaka dem i samma påse inom 10 dagar. När du inte vill vara med längre, skriver du ett brev eller kort om det.

Enkelt att bli medlem! Skriv ett brev eller ett kort att du vill bli medlem, underteckna det och skriv din adress och telefon. Sänd det till

Esperantoförlaget, Bokklubben Nova Libro
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm

Ne nur leteroj de plum-amikoj (5)

DRAMOJ EN ESPERANTO

Esperanto estas lingvo taŭga por dramaturgio: ĝia fonetiko igas ĝin facile aŭdebla, sen multa risko pri orela miskompreno; ĝia gramatika strukturo estas tia, ke oni aŭdas ĝin sen multa risko pri intelekta miskompreno; por geaktoroj estas facile paroli ĝin klare; roloj estas relative facile parkerigeblaj. Eĉ foje geaktoroj, kiuj ne vere scipovas esperanton, povas uzi ĝin profesie. Mi mem iam vidis tute kontentigan prezentadon de esperanta komedieto fare de bonaj profesiaj geaktoroj, kiuj nur studis la lingvon sufiĉe por kompreni, parkerigi kaj interpreti siajn aktualajn rolojn.


Esperanton oni sukcese uzis en pluraj filmoj; ne nur en kelkaj filmoj tute esperantaj, por esperantistoj, sed foje en nacilingvaj filmoj, kiam reĝisoro bezonis ian "fremdan lingvon", kiu ofendu nenies naciajn sentojn. Unu el la plej gravaj tiaj uzoj estis en la granda kontraŭnazia filmo de Chaplin, *The great dictator* ("La granda diktatoro").

Kutime en Universalaj Kongresoj kaj aliaj grandskalaj esperantaj eventoj oni prezentas dramojn. Mi vidis mem multajn bonegajn kaj plensukcesajn dramajn prezentadojn en esperanto. Sed preskaŭ ĉiam temis pri tradukoj: kutime tradukoj de famaj literaturaj verkoj, ekzemple de Shakespeare, Sartre, Cocteau, Ibsen, Machiavelli kaj aliaj. Ne temas pri originalaj esperantaj dramoj.

Originalajn unuaktaĵojn aŭ skeĉojn oni sufiĉe ofte prezentas en Universalaj Kongresoj, en kongresoj aŭ konferencoj naciaj aŭ regionaj. Radiostacioj, ekzemple Romo aŭ Varsovio, foje elsendas originalajn unuaktaĵojn en esperanto. Tamen la dramaturgio esperanta ja ne ankoraŭ donis rikoltojn kompareblajn kun la nacilingvaj dramaroj aŭ kun la variaj kaj maturaj poemoj aŭ novelaro esperanta.

Ekzistas multaj komedietoj kaj

skeĉoj, kies celo ne estas artiliteratura. Simplaj paroleblaj skeĉoj, sen artaj pretendoj kaj lingve iom elementaj, estas tre utilaj por instruistoj kaj kursgvidantoj. Ili helpas timhezitemajn lernantojn almenaŭ malfermi la buŝojn kaj ion diri; instruas utilajn frazojn kaj normojn de konversacia lingvaĵo; varias lecionajn rutinojn kaj do donas stimolon, plezuron, amuzon, helpojn al memoro. Prezenti skeĉon ĉe loka aŭ grupa kunveno estas taŭga celeto por kursanaro. Estas laŭdinde verki skeĉojn pedago-



gie utilajn, konsiderante bezonojn de komencantoj; des pli laŭdinde se la skeĉoj vere amuzas aŭdantaron (en kiu ofte troviĝas aliaj komencantoj). Tamen ne tiel oni kreas gravajn literaturajojn.

Kelkaj verkistoj serioze provis krei arte signifajn dramojn en esperanto. La unua provo de vera esperanta tragedio estis *Gustav Vasa* de Reinhold Schmidt en 1910. Tiu verko tiel plene malaperis sub la ondoj, ke mi neniam vidis ĝin, kaj vidis ĝian nomon nur en konsultlibroj. Aliaj fruaj dramverkistoj, kiuj meritas laŭdojn almenaŭ pro pioniraj provoj estas V. N. Devjatnin, Marie Hankel, Miguel Cases-Martin, Vicente Inglaterra, "Roksano", Nadina Kolow-

rat, R. Unterman, A. Paolet kaj Frederic Pujalà-i-Vallès. Iliajn verkojn oni nuntempe povas legi nur en grandaj esperantaj bibliotekoj.

La sola frua esperanta originala dramo, kiun oni ankoraŭ legas, kaj kiu estas siaspeca artverko polurita kaj ekvilibra, estas *Ginevra* de Edmond Privat. Tiun triaktan versan dramon oni dufoje prezentis ĉe Universalaj Kongresoj (1913 kaj 1925; en 1925 Julio Baghy reĝisoris la prezentadon) kaj ĝi represiĝis en *Junaĝa verkaro* de Privat en 1960.

La elstaran talenton de Privat oni devus eĉ pli alte estimi, sciigante, ke li verkis *Ginevra* kiam li estis nur junulo (maksimume 23-jara, kaj Baghy asertis, ke li verkis estante nur 18- aŭ 19-jara!). *Ginevra* estas perlo: ĝi havas la stilan purecon, la kristalan klarecon kaj simplan sed plene elpensitan trafecon, kiujn oni atendus de Privat. La versoj estas melodias, tamen iom variaj laŭ la diversaj parolantoj, kaj bone elparoleblaj. Se la intrigo ŝajnas iom minimuma, ĝi estas bone konstruita, kaj miksaĵo de emociplenaj dialogoj iom senmovaj, kaj streĉa faroplena klimakso, efikas ne malbone. Troviĝas fortaj sentoj, kelkaj noblaj pensoj, iom da inteligenta psikologio, eble precipe ĉe la malheroo Modredo. Fina opinio pri tiu vere bela pionira dramo tamen apenaŭ povus esti, ke *Ginevra* estas granda dramo; nur ke ĝi estis frua esperanta dramo, kiun oni povas estimi kiel literaturan verkon dignan, klasikan kaj vojomontran.

Ĝis nun la plej grava dramaturgo esperanta estas nepre Julio Baghy. La plej ambicia dramo en esperanto, almenaŭ kiu estas ankaŭ vere sukcesa artverko, estas lia *Songe sub pomarbo*, kiun li mem priskribas kiel "triakta lirika komedio en ses fantaziaj bildoj". Ĝi aperis en 1958.

Ĝi estis nova dokumento en la historio de sinoferoj kaj de esperadoj en senesperigaj cirkonstancoj, kiuj grandparte konsistigas la historion de esperanto ekde la unuaj verkoj de Zamenhof. Baghy longe antaŭpripensis sian dramon ĉefverkon. Li verkis ĝin dum la nigraj tagoj de la tragika hungara konflikto de 1956, kiam li en Varsovio sidadis treme apud radiaparato, spirite

krucumita kiel hungaro kaj kiel humana homo, vundita per ĉiu malrespekto kontraŭ la vivo kaj kontraŭ la vero. La verko tamen ne respegulas la preskaŭ frenezigan psikan torturon de tiuj semajnoj. Ĝi estas ekvilibra, foje eĉ humura, artisme tre polurita, teknike varia kaj brila, kaj ĉe la fino serena.

Songe sub pomarbo estas verko ege individua, tute unika. Ĝi similas al la romano *Hura!* per la miksado de ĝenroj kaj ŝanĝiĝoj de tonoj, kiuj povas ŝajni malharmonio kaj malbongusto, sed kiuj povas ankaŭ strange sugesti la malkongruaĵojn kaj konstante ŝanĝiĝantajn temojn de la vivo mem.

Songe sub pomarbo, epizodo de juna amo, idilia, iom miksanta la ĉarmon de pastoralo kun psikologio, kiu, se ĝi ne estas plene realisma, percepteme kaj perceptige simbolas multaj realaĵojn, enkadrigas sonĝon, kiu havas la logikan nelogikecon kaj vivkomprenigan nekompreniblecon, kiujn ofte havas niaj pli interesaj sonĝoj. Baghy certe pensis pli poezie kaj eĉ sceneje ol psikoanalize, sed liaj fantazioj ĉiam enhavas ian intelekta akcepteblan signifon. Li iom preparas la spektanton por la diversaj tonoj kaj simboloj de la sonĝo, kiam li montras kiel la junulino (Eva) estas simpla junulino, nepino de arbaristo, naiva kaj revema, sed inteligenta kaj amema, dum la junulo (Adamo) estas studento, kies kapo estas plena ne nur de amo, sed de helenismaj kaj aliaj kulturaj tradicioj.

La sonĝo mem enhavas: nimon kaj faŭnon el la helena kulturo, kaj gnomojn, elfojn kaj parolantajn bestojn de nordeŭropaj kamparaj tradicioj; originalan miton, kiu ŝuldas ion al la geneza mito pri la edena pomo, sed fandiĝas kun filozofia pli moderna simbolismo pri tempo, vivo, vivociklo kaj morto; la deziro, kiun ĉiuj el ni kredeble iam sentis, ke la tempo haltu por ni nun en feliĉa situacio, pelas la geamantojn al sorĉo, kiu iasence ekstertempigas kaj senmortigas ilin ĝis ili mem decidis malsorĉi sin mortige; bildon el la mondo sciencfikcia, pri teknokratoj, kiuj havas grandajn sciencajn kapablojn, sed nek varmajn homajn emociojn nek respondecosenton pri la mondo; kaj bildon

kvazaŭ el mezepoka lignogravuraĵo pri mortofiguro, kiu dan-cante proklamas sian universalan potencon. Meze troviĝas pli home-ordinara komika sceno, kies funkcio en la mito estas montri, kiel la ekstertempigitaj geamantoj ne plu povas kontribui al la normala vivo, sed kiu ankaŭ amuze bildigas, kiel junaj geamantoj povas finfine iĝi tedaj, malbonhumoraj maljunaj geedzoj, kaj kiel krude materialisma sinjoro povas tre alte taksi sin kiel eblan fianĉon nur pro stokoplena butikoj.

La dramo havas filozofion, fantazion, komikon, psikologion, kortuŝon, ioman streĉitecon. La versoj ĉiam fluas glate, tre varie, ofte kun virtuozaĵoj fluecoj kaj fajra vervo; diversaj ritmoj kaj stiloj taŭgas por la etosoj de diversaj scenoj. Baghy, sperta pri la viva teatro, pensis



ankaŭ pri efiko sursceneja de siaj epizodoj. La versoj estas tre deklameblaj, ankaŭ deklamindaj. *Songe sub pomarbo* vere estas eksperimento grandskala de granda artisto. Bone prezentita ĝi povus ankaŭ esti brila spektaklo. Ĝi atingis la ĝisnunan limon de la esperanta drama poezio. Ĝi pensigas pri Goethe, Maeterlinck, Madach. Tamen, eĉ dum oni rekonas, ke tiu ĉefverko de Baghy multilate havas nivelon de mondkulture valora dramo, oni povas dubi, ĉu ĝi perfekte sukcesas. Partoj estas eble eĉ iom tro longaj kaj malrapidaj; eble la rimoj mem, kiujn Baghy tiel virtuoze kaj varie manipulas, iom kontribuas al tiu foje iom trena irado; eble por la tempodaŭro de la dramo la

intrigo estas iom tro simpla; eble la profundaĵoj kaj amaraj sugestoj ĝenus aŭ tedus la naivajn spektantojn, dum la naivaj pastoralaj dialogoj ŝajnus al konscie malnaivaj teatrovizitantoj iom tro rozfreŝaj por esti interesaj. Eble la verko taŭgas pli por legado ol por la scenejo. Mi ne scias pri iu plena prezentado de ĝi. (Mi kredas, ke ĝi estas unu el malmultaj esperantaj dramoj, kiuj eble bone adaptiĝus por televido).

Songe sub pomarbo certe estas vojkoloneto en la historio de la esperanta dramarto. Neni- am antaŭe aperis io, kio kunigis tian skalon kaj tian plene ellaboritan teknikon. Eĉ se oni povus dubi pri perfekta sukceso, ĝi restas eksterordinara specimeno pri stiloj, dialogaj metodoj, ĝenraj teknikoj, lingvaj rimedoj detalaj. La historio de naciaj literaturoj foje sugestas ian leĝon: ke, kiam lingvo kaj literaturo atingis tian stadion de matureco, ke povas aperi ambicia verko, kiu preskaŭ plensukcesas, baldaŭ aperos la majstroverko, pri kies sukceso neniu povas heziti: la rimedoj kaj la kriterioj estas pretaj.

Dume, *Songe sub pomarbo*, grava verko de artisto sentoriĉa, pensoriĉa, fantazioriĉa kaj super ĉio artisme konscienca, meritas minimume, ke ĉiu serioza studanto pri la literaturo de esperanto legu ĝin atente kaj mem juĝu pri ĝi.

Eĉ sen tiu grandskala verko Baghy restus ĝis nun la plej profesieca kaj grava dramaturgo en esperanto. Liaj poemoj inkluzivas plurajn deklamindajn dialogojn, kiuj estas esence drametoj pri la homa spirito. Liaj multaj unuaktaj dramoj kaj vodeviloj restis longe dise en diversaj gazetoj. Oni represis kvin en *En maskobalo* (Budapeŝto 1977). Kredeble lia plej konata vodevilo estas *La holanda pupo*, plurfoje prezentita. Bona specimeno de unuakta dramo estas 1:7, trovebla en *Ora duopo*, 1966.

Kelkaj drametoj iom meritaj de aliaj verkistoj ankaŭ kaŝiĝas ĝis nun en gazetoj. Esperanto kredeble jam liveris sufiĉajn bonajn specimenojn por antologio de drametoj, similskala al 33 *rakontoj*; kaj mi suspektas, ke tia antologio, same lerte redaktita, konatigus plurajn valorajn, preskaŭ forgesitajn verkojn.

Inter esperantaj unuaktaĵoj, kiujn oni trovas jam en volumojn, kredeble per multo la plej valora estas *Kvazaŭ birdoj konstruas* de William Auld; tion oni trovas en lia poemaro *Unufingraj melodioj*, 1960.

Ĝi estas malgranda komedio, verkita tute per elegante poluritaj, glataj senrimaj versoj, kiuj samtempe piroteknikas per multaj freŝaj, surprizaj parolturnoj, kaj lasas impreson de ia natureca konversacio; ĝi estas io majstra rilate al la lingvaĵo. La intrigo estas minimuma sed sufiĉa kaj donas ian streĉitecon kaj peripeitian psikologion: en kadro (ne detale prezentita) de la helena civilizo vojaĝinta edzo kaŝas siajn trajtojn per barbo por tenti sian propran edzinon. Post multaj lerte elektitaj vortoj, li eligas de ŝi kontraŭvolan konfesion pri deziro, rivelas sin, denuncas ŝin. Sed la edzino ne pardonpetas. Ŝi ĝuste kaj digne ofendiĝas kaj la edzo devas trovi taktajn rimedojn por havigi al si ŝian pardonon. Estas nur tri rolantoj: edzo, edzino kaj servistino. La komedio estas perfekta siaspece, brile ŝparema, samtempe tre riĉa stile, sprite kaj psikologie. Sed ĝi estas perlo nur malgranda.

Du longaj dramoj ne sen meritoj, kvankam ne sur la nivelo de Baghy aŭ Auld, estas *Ivan VI* de Geraldo Mattos kaj *Jozefo* de J.D. Applebaum. Inter drametoj estas menciindaj: kelkaj skeĉoj de Raymond Schwartz; la serioza drameto *La reto* de Bukar, kaj la plej bonaj drametoj de Emilija Lapenna kaj Marjorie Boulton. Pligrandiĝas, kaj kvalite pliboniĝas, la stoko de skeĉoj kaj dramoj, kies celoj estas ĉefe pedagogiaj, ekzemple de Boulton, de Zora Heide, Bertram Potts, R. Mackay. Sed pedagogia celo preskaŭ neeviteble malebligas altan artan nivelon.

Do, kvankam la studanto trovos kelkajn esperantajn originalajn dramojn legindajn, inter ili kredeble unu vere imponan longan dramon kaj unu brile poluritan drameton, li ne trovos multon. La esperantistoj ĉiam deziris bonajn dramojn. Jam en 1903 Zamehof mem en letero esprimis deziron, ke estiĝu esperantista teatra grupo. La lingva materialo jam estis preta por majstroverko, sed la majstro ankoraŭ ne montris sin.

(daŭrigota)

Raporto pri vizito al Leningrado

Por turisma vojaĝo al Leningrado en junio mi jam en marto kontaktis la tiean delegiton, s-ro Podkaminer, kiu afable respondis donante telefonnumerojn por kontakto post alveno. Mi kaptis la eblecon jam la unuan tagon telefonante al s-ino Barbara Cvetkova, kiu spitante la fortan pluvon venis al mia hotelo por privata vizito al muzeo, kie la leningradaj monumentoj estas prezentataj en miniatura formato.

Kvankam mia oficiala turisma programo estis sufiĉe temporaba, mi tamen trovis tempon por viziti la klubkunvenon de la leningradaj esperantistoj. Pro tio ke temis pri ekstra kunveno oni sukcesis kunvoki nur 25 samideanojn. Ili ŝajne tre scivolis pri mia vizito kaj mi provis rakonti ĉion pri mia esperantista vivo, la jubileo de SEF kaj la Malmöklubo, eldonado de libroj ktp.

Ĉar mi estas kolektanto ne nur de esperantaj objektoj, sed ankaŭ aliaj aĵoj, ekzemple ludkartoj, mia rakonto pri tio rezultis en invito al la plej ampleksa kolektaĵo de tiaj objektoj en Leningrado. Kun kvin el la novtrovitaj amikoj mi vojaĝis tien kaj estis kore bonvenita de gesinjoroj Perelman, kiuj bedaŭrinde ne parolis esperanton (ankoraŭ), sed dank' al ioma

reciproka scio de la germana ni povis interkompreniĝi. Kaj mi ege ĝuis havante eblecon vidi tiom da interesaj kartoj kaj ceteraj objektoj apartenantaj al kartludado.

Alian vesperon mi estis invitita al Irina Gedova, 16-jara knabino, kiu flue parolas esperanton. Ŝia patrino regalis per teo kaj buterpanetoj kaj Irina montris al mi siajn kolektojn de poŝtmarkoj, esperantaĵoj kaj kartoteko kun manskribitaj receptoj pri manĝaĵoj, tre bele aranĝita. Poste ni ĉiuj iris al Saŝa Ivanov por rigardi fotojn kaj belan kolekton de medaloj diverslandaj, i.a. de svedaj reĝoj Karl IX, Gustav II Adolf, reĝino Kristina kaj pri la reĝo Björn (kiu laŭdire estis tiu, kiu bonvensalutis Ansgar ĉe lia alveno al Birka en 829!). Do ankaŭ tiu vizito fariĝis bela evento inter la vere ĉarmaj, plejparte inaj, esperantistoj de Leningrado.

La matenon, kiam mi pretis foriri, venis kvin ĉarmulinoj kaj du 'uloj' por min adiaŭi, kaj estu certaj, ke tio signifis bonan propagandon por esperanto, kiam mi por la ceteraj 62 kunvojaĝantoj povis rakonti pri miaj interesaj travivaĵoj inter tiuj afablegaj samideanoj.

Sune Ahlm



Barbara, Nellie, Sune, Saŝa, Irina: jen memorbildo pri la vizito de Sune Ahlm al Leningrado.

TABULO

Tre aprezos viajn leterojn la jena korespondpetanto. Li estas mezaĝa, paralizita je 75% kaj uzas rulsegon.

Nomo. Ólafur Steinsen.
Strato. Rauðarárstig 7.
Urbo. 105 Reykjavík.
Lando. ÍSLAND.

Ĉu vi ne havis eblecon viziti la ĉiĵaran UK en Brazilo? Havigu al vi korespondanton en tiu lando, ekzemple Mário Baumes, Pk 7139, 80.000 Curitiba-PR, Brazilo. Mário estas 18-jara studento kaj deziras korespondi kun sam- aĝaj fraŭlinoj el la tuta Nordo.

Ĉu historio kaj arto interesas vin? Tiam vi nepre respondu al la jena koresponda anonceto de Lidija Ambrojeviĉ, ulica Jantra n. 13, BG-1504 Sofia, Bulgario. Lidija laboras nome en la Nacia Artgalerio!

16-jara kaj kolektantino de bildkartoj kaj poŝtmarkoj estas Jolanta Matviej, Str. Rózana 3, PL-08-400 Garvolino, Pollando.

Busŝoforo 28-jara deziras korespondi kun svedoj. La adreso: Béla Kovacs, Deak F. u. 68, H-8741 Zalaapati, Hungario.

Turismo, foto kaj muziko estas la interesoj de Francisko Párdi, Tulipánfau. 10, H-1161 Budapest, Hungario. Skribu al li pri tiuj temoj.

Anita Nowakowska bezonas ricevi multajn adresojn. Legu kial! Antaŭ du jaroj ŝi aranĝis en sia lernejo esperantorondon, en kiu ŝi instruas al siaj kunlernejanoj esperanton. La lernejo estas ankaŭ muziklernejo, do ŝi ankaŭ organizis kantenemblon, kiu kantas esperantajn kantojn. Sekve de tiuj kursoj nun oni instruas esperanton en preskaŭ ĉiuj lernejoj de la urbo kaj Anita elektigis prezidanto de la regiona (vojevodia) junulara esperantomovado. En ĉiuj sennombraj kursoj oni deziras korespondadresojn - ankaŭ el Svedio. Sed ankaŭ Anita mem deziras korespondantojn. Ŝi estas 17-jara, vizitas liceon kaj muzikan mezlernejon kaj ŝatus korespondi pri esperanto, kompreneble muziko kaj ankaŭ pri humanismaj sciencoj. La adreso estas: Anita Nowakowska, ul. Szymanowskiego 2/12, PL-75-546 Koszalin, Pollando.

En Leningrado atendas viajn leterojn du esperantistinoj. Unu estas dentistino, kiu prefere korespondus kun samprofesiuloj. La adreso estas Nelli Kublanova, str. Moŝovaja 39-23, Leningrad 191028, Soveta Unio.

La alia estas 16-jara knabino, kiu kolektas poŝtmarkojn kaj esperantaĵojn. Ŝi estas Irina Gedova, pr. M. Toreza 13-4, Leningrad 194021, Sovetunio.

El Aŭstralio skribis al ni 11-jaraĝa Jodee Tapper. Ŝia klaso kaj ŝi mem komencis ĵus lerni esperanton kaj ŝi deziras ricevi samĝan korespondanton en Svedio. La adreso estas Jodee Tapper, 2 Keats Street, Mandurah 6210, Western Australia. Mandurah situas 79 km for de Perth kaj estas populara turisma loko ĉe la maro.

Daŭre venadas korespondpetoj el Irano. Nova esperantistino estas la 19-jara Goli Soleimani, P.O. Box nr 7, Kelachaj, Gilan, Irano. Helpu al ŝi lerni pli da esperanto.

Astrid Weller, An der Schnelle 22, DDR-2130 Prenzlau, GDR, estas 15-jara knabino. Eksciu mem, kio estas ŝiaj preferoj!

Johan Matland, norvego konata ankaŭ al multaj svedoj, forpasis antaŭ nelonge. Kio ne estas konata al la svedoj, estas, ke Johan Matland faris multajn tre bonajn tradukojn el la norvega literaturo. Por honori lian memoron lia edzino kaj Norvega Esperantista Ligo decidis aranĝi tradukan konkurson sub la nomo *Premio Johan Matland*.

La tasko estas traduki la suban poemon de André Bjerke. La tradukon oni sendu en kvar ekzempleroj al Norvega Esperantista Ligo, Boks 942 Sentrum, Oslo 1 antaŭ la lasta de decembro 1981. La nomo de la tradukinto ne aperu sur la traduko, kie oni indiku nur pseŭdonimon. En fermita koverto, kun indikita pseŭdonimo, troviĝu la nomo kaj adreso de la tradukinto. La premio estas 1000 norvegaj kronoj.

Berceuse

Sov, sov, lille mann.

Livet er en drøm.

Over mørke morildvann seiler du mot nattens land.

Alle er alene.

Bølger nynner mot din båt:

Livet er en drøm.

Dyp er sjøen, salt og våt som av mange øjnes gråt.

Alle er alene.

Natten er så lang, så lang.

Livet er en drøm.

Synk i søvnens myke fang, drøm at det blir dag en gang.

Alle er alene.

Bare synke, synke ned!

Livet er en drøm.

Der i søvnens sjø et sted vil vår uro finne fred.

Alle er alene.

Ensomt suser vår planet.

Livet er en drøm.

Intet vet vi. Det vi vet er at alt er ensomhet.

Alle er alene.

Lev, lev, lille gutt.

Livet er en drøm.

Før du aner, er det slutt.

snart er alle broer brutt.

Alle er alene.

Drøm, drøm, lille vår.

Livet er en drøm.

Hvor vi kom fra, hvor vi går, er det ingen som forstår.

Alle er alene.

Gro, gro, lille frø.

Livet er en drøm.

Mørket mumler om vår ø:

Kanskje skal vi aldri dø?

Alle er alene.

Aŭskultu la radion!

Kun la aŭtuno la aŭskultado de la radioprogramoj de stacioj, kiuj dissendas en esperanto, plioftiĝas. La 27an de septembro ni krom tio reiras al la ordinara suna horsistemo. La horoj indikitaj ĉikune temas do pri la nesomeraj horoj.

Multaj radiostacioj dissendas en esperanto, sed ne ĉiuj estas aŭdeblaj en Svedio. Por faciligi al vi la aŭskultadon Jan-Olof Svensson regule preparas listojn pri stacioj aŭdeblaj en Svedio kaj pri iliaj sendotempoj. La listo, kiu aperas ĉitie estas komprenata jene:

Unue venas la nomo de la stacio; sekvas la horoj de la dissendo; trie venas la ondlongoj/frekvencoj de la stacio. Bonan aŭskultadon!

Ĉiutage

Varsovio: 06.00 — 06.30

200/1503 75,85/3955

50,04/5995 48,90/6135

41,27/7270

Varsovio: 16.30 — 17.00

42,11/7125 31,50/9525

Pekino: 21.00 — 21.25

32,03/9365 30,11/9965

26,21/11445

Varsovio: 22.30 — 22.55

200/1503 75,85/3955

50,04/5995 49,22/6095

41,18/7285

Lunde

Berno: 19.00 — 19.10

75,28/3985 48,66/6165

31,46/9335

Berno: 21.30 — 21.40

samaj ondlongoj/frekvencoj

Marde

Zagrebo: 23.45 — 24.00

262/1143

Ĵaŭde

Vatikano: 07.10 — 07.25

48,31/6210 41,38/7250

31,17/9625 25,61/11715

Berno: 19.00 — 19.10

same kiel lunde

Berno: 21.30 — 21.40

same kiel lunde

Sabate

Vieno: 17.45 — 17.55

48,74/6155; ripeto dimanĉe

Berno: 19.00 — 19.10

same kiel lunde

Radio Roma: 21.00 — 21.20

41,24/7275 30,90/9710

25,42/11800

Berno: 21.30 — 21.40

same kiel lunde

Dimanĉe

Vieno: 06.45 — 06.55

same kiel sabate

Vatikano: 21.05 — 21.15

196/1530 48,47/6190

48,31/6210 41,38/7250

31,17/9625 25,64/11700

19,84/15120

Sed ne sufiĉas, ke vi aŭskultas la esperantajn dissendojn; skribu al la stacioj kaj informu ilin, ke vi faras tion! Skribu kion vi aŭdis — aŭ ne aŭdis —, komentariu, salutu. De la kvanto de viaj leteroj dependas, kiom longe kaj kiom ofte oni dissendos de ĉiu unuopa stacio. Jen la adresoj al la supre menciitaj stacioj:

Svisa Radio Internacia

Esperanto-fako

CH-3000 BERN 15, Svislando

Radio Pekino

Esperanto-sekcio

BEIJING, Ĉina PR

Radio Roma

Esperanto-fako

Pk. 320

I-00100 ROMA Centro corr.

Italio

Radio Polonia
Esperanto-redakcio
Pl. 46
PL-00-950 WARSZAWA 1
Pollando

Radiovaticana
Esperanto-redakcio
Piazza Pia 3
I-00193 ROMA, Italio

ORF
Esperanto-redakcio
A-1136 WIEN, Aŭstrio

Radio Zagreb
Esperanto-fako
YU-41000 ZAGREB, Jugoslavio

Uppsala naŭdekjara

La 75 jaroj de SEF estas nenio kontraŭ la 90 jaroj de la Esperantosocieto de Uppsala!

Jes, tian jubileon povas ĉijare festi la klubo, kiu jam en la plej frua historio de esperanto ludis gravegan rolon. Dum la jaroj 1895 — 1899 la klubo eldonis la gazeton *Lingvo Internacia*, kiu estis la tiama internacia organo de la nova esperantismo. La gazeto de Zamenhof (*La Esperantisto*) devis, pro cenzurmalpermeso, ĉesi aperi. *Lingvo Internacia* certigis la daŭrigon de la laboro de Zamenhof kaj de esperanto mem.

Siajn 90 jarojn la klubo intencas festi per **vintra festo**, kiu okazos la 15an de decembro. Al tiu festo oni invitas ankaŭ ĉiujn aliajn esperantistojn. Tiu festo estos neniel grandioza, do vi ne atendu bankedon. Vi povos ricevi kafon, kukojn, torton, spicvinon, kantojn kaj muzikon kaj ... kontraŭ pago de proksimume 20 — 25 kronoj.

Se vi bezonas tranokti, oni provos aranĝi tion por vi senpage hejme ĉe iu esperantisto. Anoncu vian partoprenon iam en oktobro aŭ novembro al Niklas Gustavsson, Hesselmans väg 63, 752 63 Uppsala.



PERSONE

— lun vesperon, post kluba kunveno, dum kiu iu rakontis pri persekutoj kontraŭ esperantistoj, kelkaj el ni restis, kiel ni ofte kutimas, babilante en la klubejo eĉ post la fino de la kunveno. Estis nur kvino aŭ seso da ni kaj nia babilado temis pri la aŭdita prelego.

— Ĉu iu el vi scias, ke fakte ankaŭ mi iam estis malliberigita pro esperanto? Lundgren subite demandis.

Neniu el ni iam aŭdis pri tio. Anstataŭ lasi Lundgren rakonti, ni komencis starigi al li demandojn pri eblaj cirkonstancoj de lia malliberigo: ĉu vi partoprenis en la hispana civilmilito? ĉu vi troviĝis en Germanio dum la persekutoj de la nazioj? ĉu vi partoprenis malpermesitan kunvenon en fremda lando? kaj kelkajn pliajn pli-malpli verŝajnajn konjektojn.

Lundgren iom aŭskultis nin, poste li ekridegis.

— La vero estas fakte multe pli neverŝajna: mi estis malliberigita en Svedio.

Tiu aserto silentigis nin; fakte neniu el ni povis kredi, ke tio iam okazis, ne en Svedio.

— La vorto malliberejo eble estas iom trompa, Lundgren klarigis. Ĝivekas ĉe vi bildojn pri severaj longdaŭraj punoj. Pri io tia ne temis. Sed vere mi devis iam pasigi tutan nokton en malliberejo — la sola nokto, kiun mi pasigis en tia loko — kaj la kaŭzo de tio estis esperanto.

Ankaŭ tiu klarigo, multe malpli fantazia, ne kontentigis nin. Ni ree komencis bombardi lin per demandoj: ĉu vi fordiboĉis la kluban kason? ĉu vi skribadis anonimajn minacleterojn al la tiama prezidanto de SEF kaj oni malkovris vin? ĉu vi rompvis vian fianĉpromeson al esperplena esperantista fianĉino?

Kiel vi rimarkas, niaj demandoj fariĝis pli kaj pli neseriozaj.

Lundgren reekridis kaj skuis la kapon.

— Temis fakte pri tute serioza afero, li komencis. Tio okazis kompreneble antaŭ tuta amaso da jaroj (tion ni volonte kredis al li). Mi estis nova esperantisto, ankoraŭ tute juna, dek ses aŭ

dek sep jara. kaj mi estis tute plena je volo igi ĉiujn lerni esperanton. Prelegantoj pri la internacia lingvo jam vizitis ankaŭ la urbeton, kie mi tiam loĝis, sed kurso estis promesita kaj mi opiniis, ke ĉiuj devos ekscii pri ĝi.

La eta grupo de entuziasmoj, kiuj interesiĝis pri esperanto, ne havis rimedojn por organizi vastskalan informadon. Gazeton nia urbeto ne havis kaj la najbarurbaj gazetoj ne multon skribis pri tio, kio okazis ĉe ni. Ni elpensis malmultekostan, sed radikalman manieron informi pri la okazonta kurso.

Mia patro estis murpentristo, same kiel mi, kaj mi kaŝe "pruntis" iom da farbo el lia stokejo. Mi ankoraŭ memoras, ke ĝi havis helverdan nuancon.

lun nokton kamarado kaj mi portis tiun farbon al la ĉefa urbeto domo — la urbodomo — kaj komencis pentri sloganon sur ĝin. Mia kamarado komencis per granda verda stelo, mi per la vorto esperanto. Kion ni intencis skribi, mi jam forgesis, ĉar mi nur sukcesis veni ĝis la litero P, kiam la kamarado ion rapide flustris kaj malaperis. Momenton pli poste la nokta gardisto jam tenis min. Mi devis sekvi lin en la arestejon, kiu situis en la sama domo kaj tranokti tie.

Matene mia patro estis vokita kaj la tuto solviĝis tute sencere: li bezonis nur promesi, ke ni forlavos la "skribaĉaĵon", tasko sufiĉe facila, ĉar temis pri akvobazita farbo.

La malmultaj loĝantoj, kiuj sukcesis rimarki nian noktan laboron, iom miris, kian signifon havas la signo, kiu iom similis bovokapon (la stelo ne fariĝis preta) kaj la literoj ESI apud ĝi (ankaŭ la P ne fariĝis preta). Kiel vi aŭdis, nia "informa kampanjo", kiel oni nomus tion hodiaŭ, fariĝis kompleta fiasko, sed la kurso tamen fariĝis granda sukceso."

Ni iom "kompatis" Lundgren pro lia "martireco", kiel ni tion nomis, kaj promesis meti memortabulon sur tiun urbodomon, sed li ne volis malkaŝi, pri kiu urbeto temis. Ĉaŭ!

Eta Mi



Kongressen i Brasilia uttalar sig

Den 66e internationella esperantokongressen i Brasilia hade som huvudtemat "Kulturer och språk — bryggor eller barriärer?", en utveckling av diskussionerna förda under förra årets kongress i Stockholm. Även kongressens resolution knöt an till samma ämne. I fri översättning säger resolutionen följande:

"Massmediernas allt större inflytande över människan betyder en fara, att hon förlorar sin individualitet.

Det finns ett hot, att människan, oförmögen att reagera annat än passivt, accepterar denna enkelriktade informationspåverkan.

De stora språkens kulturpåverkan försöker underkasta och ibland undanröja de mindre språkens kulturer och ta ifrån deras användare rätten till en egen kultur.

Det internationella språket esperanto har som mål att bygga broar mellan folken och på så sätt bidra till verkliga kontakter mellan alla människor på jorden.

Människan kan bli delaktig i kulturutbytet bara när hon har "broar", som gör dubbelriktad kommunikation möjlig.

Eftersom esperanto redan bevisat sina möjligheter att tjäna som lämplig dubbelriktad bro mellan olika kulturer, vänder sig kongressen till alla människor, etniska grupper, nationer, stater och internationella organisationer med en vädjan att erkänna

- vad esperanto har uppnått och vad det står för;
- dess möjligheter att skapa en bro mellan olika kulturer i världen, som täcker alla kommunikationsbehov, så att en aktiv och medveten kultur tar form;
- och dess möjligheter att företräda, på det internationella planet, människans högsta värden och önskningsar."

Unescos generaldirektör skickar en hälsning

Unescos generaldirektör, Amadou Mahtar M'Bow har även till årets internationella esperantokongress riktat en hälsning, i vilken han säger bl a:

"Jag tar tillfället i akt att bekräfta det intresse som Unesco har för UEAs verksamhet, och jag bekräftar UEAs stora bidrag i utvecklingen av internationell kommunikation, förståelse mellan folken och genom dessa till förstärkningen av freden på jorden — vilket är ett av Unescos främsta mål.

I år har UEA valt till ämne 'Kulturer och språk — bryggor eller barriärer?'. Detta ämne knyter an till Unescos primärintressen. Våra organisationer kämpar oavbrutet mot andra kulturers ignorering — ett hinder mot god samlevnad mellan nationerna — som förorsakar missförstånd och konflikter ..."

KORT & GOTT

VÄSTTYSKLAND. Esperantotalande järnvägsmän hade sin 33e internationella kongress i Regensburg under en vecka i mitten av maj. Kongressen kunde räkna med 515 anmälda, som hade diskussioner, föredrag, och olika möten på programmet. Järnvägsmännens esperantorganisation IFEF är den största fackliga sammanslutningen inom esperantorörelsen.

NEDERLÄNDERNA. Universala Esperanto Asocio, det internationella esperantoförbundet, har nu medlemmar i 100 olika länder.

FRANKRIKE. Vid Sorbonneuniversitetet i Paris doktorerade i slutet av juni Francois Lo Jacomo; hans doktorsavhandling bar titeln: "Frihet och auktoritet i esperantos utveckling".

INDIEN. Vid universitetet i Puneo har Probal Dasgupta esperantokurs två gånger i veckan.

RUMÄNIEN. Esperanto undervisas vid en hel rad språkinstitutioner vid universiteten. Kurserna

pågår i tre år.

Vid Föreningen för språkvetenskap har man bildat en esperantosektion.

Den rumänska esperantorörelsen, fortfarande oorganiserad, räknar med 2300 aktiva esperantister, huvudsakligen unga.

KINA. Under våren fanns det esperantokurser i ett fyrtiotal olika städer med ca 10 000 deltagare. Dessutom fungerade 15 kurser vid högskolor och 20 000 elever lärde sig esperanto per korrespondens.

ÖSTTYSKLAND. De östtyska esperantisterna är organiserade i Kulturförbundet. Nyligen fick deras organisation ändra namn från "arbetsgrupp" till "Esperantoförbundet inom Kulturförbundet".

KENYA. Internationella Esperantoförbundet har under senare tid fått många förfrågningar om esperanto från Kenya, som resulterat av en liten annonskampanj.

THAILAND. I Bangkok har man bildat Thailands Esperanto-Institut.